

La Eklezia Revuo

Organo de la Eklezia Esperantista Ligo



Redakcio kaj Administracio:
FARNLEY TYAS VICARAGE,
HUDDERSFIELD, ANGLUJO.

ELDONODATO:
La 31-a de JULIO 1921

NUMERO 12.

[3a. VOLUMO. No. 4.]


JARABONO: (AFRANKITE)

EN LA BRITA INSULARO, 2s. 6p.

EKSTERLANDE, Sm. 1.5

SPECIMENA NUMERO (AFRANKITE), Sd. 30

PRO REUNIĜO
ANOJ DE ĈIU KRISTANA
EKLEZIO ALIĜU AL



LA EKLEZIA
ESPERANTISTA LIGO.
Adr.: Farnley Tyas Vicarage,
apud Huddersfield, Anglujo.

REDAKCIAJ KAJ ADMINISTRACIAJ AVIZOJ

Redaktoro kaj Administranto de *La Eklezia Revuo*: lia presbitera moŝto A. J. ASHLEY, F. B. E. A., paroĥestro de Farnley Tyas, Huddersfield, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiun komunikacion rilate la Revuon.

Eldonodato: *La Eklezia Revuo* estas kvaronjara. Pro diversaj kaŭzoj rilate la efikecon de la revuo estas neutile precizigi la eldonodaton; sed ĝenerale oni elsendas ĝin dum la unua duono de ĉiu kvaronjaro.

Enhavotabelon kaj titolopaĝon oni eldonas post eligo de ĉiu dekduo da kajeroj. La Administranto ne eldonas anstataŭbindan kovrilon; sed volas bindigi la Revuon por abonantoj laŭ kondiĉoj speciale aranĝeblaj.

Reklamtarifo: (unufoja enpresoj) 1 paĝo, Sm. 15; 1/2 p., Sm. 8; 1/4 p., Sm. 4.5; 1/8 p., Sm. 2.5; 10 vortoj, Sd. 40. Rabato por kvar aŭ plimultaj enpresoj. Petu detalan tarifon. La Redakcio kaj Administracio penas certigi, ke la reklamantoj estas fidindaj sed tute ne akceptas ian respondecon pri reklamoj.

Manuskriptoj, k. t. p.: La Redaktoro zorge konsideros manuskripton alsenditan; sed li ne akceptas ian respondecon pri ĝi, kaj ĝenerale ne resendas neakceptitan manuskripton se oni ne kunsendas adresitan koverton kaj ankaŭ poŝtelspezon. Kunlaborantoj bonvole skribu legeble, preferinde per skribmaŝino, kaj nur sur unu flanko de la papero.

Korekto, Represo, k. t. p.: la Redaktoro rezervas al si rajton korekti manuskripton enpresotan en *La Eklezia Revuo*. Sen interkonsento kun la Redaktoro represi aŭ nacilingven traduki artikolon aŭ tradukaĵon, kiu aperas en *La Eklezia Revuo*, estas malpermesate.

Recenzo: la Revuo raportas novajn verkojn, gazetojn, k.t.p., kondiĉe ke la Redaktoro donace ricevu DU EKZEMPLEROJN kaj, ke ili estu sufiĉe gravaj kaj interesaj. Oni interŝanĝas tiun ĉi Revuon kontraŭ alilandaj gazetoj po du ekzempleroj.

Kaŭze de necertaj kondiĉoj de la nuna tempo la Redakcio ne *garantias* publikigon de *La Eklezia Revuo* aŭ al abonantoj aŭ al reklamantoj.

Respondeco. La Redaktoro ne akceptas respondecon pri opinioj esprimataj en artikoloj de *La Eklezia Revuo*.

AL ĈIU SERIOZA ESPERANTISTO

La sukceso de miaj Esperantaj Poŝtaj Kursoj estas treege kontentiga. Esperantistoj en ĉiu partoj de la Anglalingva mondo nun profitas per la kapabla instruado liverata per la Kursoj, kaj ili raviĝas pro la komprenebla, klariga, ŝatiga maniero laŭ kiu iliaj penoj estas kontrolataj, iliaj eraroj klariĝas, kaj iliaj malhelpaĵoj formetiĝas. Ĉi tio fariĝas, ne per la magio, sed per originalaj laŭproblemaj ekzemploj, aludoj kaj klarigoj. La studentoj ŝatas la senton de individua simpatio kiu troviĝas inter ili kaj la Instruanto, kiel inter samideanoj. Tiu ĉi "atmosfera" estas esenca elemento de mia sistemo; kaj helpis multe al la sukceso de la Kursoj. Vi povas preni la Unuagradan Kurson (21/-) por komencantoj kaj rekomencantoj; la Altgradan Kurson (21/-) por tiuj kiuj volas akiri la Altgradan Diplomon; kaj la Tradukan Kurson, por tiuj kiuj volas igi sin kapablaj traduki Esperanten la klasikajojn de la Angla Lingvo.

Unu Enskribon oni akceptas por la Tri Kursoj je la speciala malalta sumo de £2, 7s. Mi estas preta kontroli vian studadon de la komenco ĝis (kaj preter) la Altgrada Ekzameno. Permesu al mi konsili pri viaj bezonoj.

Petu Prospektojn, kiuj klarigas ĉion. Inkluzivaj Pagoj. Individua instruado.

**ALBERT CHAPMAN, F. B. E. A. (Hons. Diploma), M. S. P.
WALTON HIGHWAY, WISBECH**

L'ESPERANTO

Internacia Monata Revuo

sub patronado de Itala Katedro de Esperanto
Eliras en S. Vito al Tagliamento (Italio)

LITERATURA KAJ KORESPONDA
FAKO. LINGVAJ LECIONOJ PER ES-
PERANTO. ENIGMOJ. KONKURSOJ

Jarabono Italajn Fr. (Lirojn) 5

Plena Kurso de Itala Lingvo por Espe-
rantistoj

Ital. Fr. (aŭ Lirojn) 6.50

AMERIKA ESPERANTISTO

du-lingva organo de la Esp.-Asocio de
N. Ameriko celas antaŭigi

ESPERANTON

inter la plej multenombra parolantaro de la
angla lingvo en la mondo:

Jen nia bataalkampo!

1 jaro — \$ 1.00 usona; 20 resp.-kup.

ESPERANTO OFFICE

W. NEWTON, 65, Mass., Usono.

La Eklezia Revuo

NUMERO 12. VOL. 3, NO. 4.

ELDONODATO: 31 JULIO, 1921.

ENHAVO:

La Eklezia Mondo	75	renco (<i>Nikolao Hermano el Lotaringo</i>)	90
La Espero (<i>Coates</i>)	85	Bibliografio	93
L'Allegro (<i>Milton</i>)	86	Kroniko de la E. E. L.	94
Kolektitaj Pensoj de Frato L ^o ŭ-			

LA EKLEZIA MONDO.

AUSTRUJO.

INTERNACIA KATOLIKA PORPACA KONFERENCO. Okaze de la universala kongreso katolika en *Graz*, aranĝata per la Internacio Katolika (Ika) 7—11 august 1921, okazos internacia katolika porpaca konferenco por pritrakti la problemon kaj tutmondan organizon de la internacia katolika porpaca movado. La prepara komitato starigis tuj internacian komitaton por montri la absolutan politikan neŭtralecon, kiu invitis ĉiujn geamikojn de la katolika porpaca movado al bonvola partoprenado. Ĉiujn informojn donas la organiza kongreskomitato *Graz, Karmeliterplatz 5, Austriujo. De la Ĉefsekretario de la Internacio Katolika.*

BULGARUJO.

EKLEZIA AGADO. Kvindek jaroj forpasis de post la renovigo de la fundamentoj de la bulgara Eklezio. Nuntempe la eklezianoj celas vidi la bezonojn de la Eklezio, forigi la mankojn de ĝiaj organizo kaj administrado kaj ĝin reformi tiel, ke ĝi denove fariĝu potenca, religikultura kaj religi-kleriga faktoro en la bulgara popolo. Konferencoj de la Eklezio ellaboras kaj konfirmas regularon por la Bulgara Ortodoksa Eklezio; kaj oni ankaŭ pridiskutas la alproksimigon de la Bulgara al la aliaj kristanaj Eklezioj kaj la fondon de Eklezia Internacio. *De nia bulgara Korespondisto, I. H. KRESTANOFF.*

ĈEĤOSLOVAKUJO.

GRANDA RELIGIEMO. En nia lando regas la religia movado. Multaj miloj da loĝantoj akceptas nun la konfeson ĉeĥoslovakana. Tiu ĉi konfeso (eklezio) havas katolikan riton kun nacia slava lingvo

anstataŭ la latina; ĝi ankaŭ havas edziĝintajn pastrojn kaj memstarecon. La nombro de novaj anoj estas 260,000 en la ĵus finiĝinta jaro! Ankaŭ la bohemiaj fratoj (moravaj) nuntempe havas multe da sukcesoj: ĉirkaŭ 150,000 personoj akceptis tiun religion. *De nia ĉeĥoslovaka Korespondanto.*

* * *

NOVAJ EPARĤIOJ. La plej granda parto de la romkatolika ĉefeparĥio *Esztergom* nuntempe apartenas al Slovakujo. Depost la ĉeĥa okupado oni regis ĝin pere de vikario episkopa. De nun oni volas ĝin fari aparta eparĥio kun ĉefloko *Nagyszombat (Trnava)*. En la ceteraj slovakujoj eparĥioj oni plejparte forigis la hungarajn episkopojn kaj nomis slovakajn. Tri novajn episkopojn oni konsekris antaŭnelonge en la urbo *Nyitra*.

* * *

PERSEKUTO DE LA ROMKATOLIKA EKLEZIO. Troviĝas tiuj, kiuj anstataŭ unuigi la disigitan kristanaron, disigas ĝin kaj semas la semon de disiĝo. Oni persekutas la Romkatolikan Eklezion en Ĉeĥoslovakujo. La persekuto plejparte furiozas en la regiono *Plzen (Pilsen)*, kie la Adventistoj, Husitoj, kaj la anoj de la Ĉeĥa Nacia Eklezio faras egan propagandon kontraŭ la Romkatolika Eklezio. Same agadas la Socialdemokratoj; sed ili estas la apostoloj de la senkonfeseo. Oni oficiale subtenas la movadon flanke de la ŝtato. La tuta agado havas politikan karakteron. La mondhistorio instruas, ke politik-religiaj movadoj neniam portis bonan rezulton. La ĉimaniara agado neniel povas esti laŭ la volo de nia Sinjoro, kiu ne predikis la ŝovinismon kaj la fanatikecon, sed nur amon kontraŭ niaj najbaroj.

* * *

RELIGIA EDUKADO EN LA HUNGARAJ LERNEJOJ. La Hungara Instruministerio eldonis novan ordonon por la mezlernejoj (gimnazioj, reallernejoj, kc.). Ĉi tio interalie pritraktas la religian edukadon de la lernantoj. *Paragrafo 37:* — La lernejo reguligas la vizitadon de la lernantoj al danclernejoj; kontrolas ilian vizitadon al amuzejoj; kontrolas la hejmajn legaĵojn kaj, se ĉirilate oni trovas ion nekonvenan, la lernejo havas la rajton kaj devon postuli kuracadon de la gepatroj aŭ de iliaj anstataŭantoj. *Par. 36:* — La flegado de la morala, religia, patriota sento estas devo de la profesoroj. *Par. 80:* — Estas la precipa devo de la profesoroj efektiviĝi, ke ne efiku kun detruanta influo al la lernantaro tiuj novaj spiritaĵoj movadoj, kiuj, ne havante bazon en la pasinteco de la nacia historio nek en la vera nuntempa vivo de la nacia socio, atakas sur kampo socia, scienca, kaj literatura, la tradiciajn valorojn de la nacia, familia, kaj individua vivo. Kontraŭ la venena efiko de ĉi tiuj influoj la profesoroj plejbone defendas la animojn de la lernantoj se ili per ekzemplo kaj instruo inokulas en iliajn spiritojn profundan kaj neforviŝeble profundan religiecon, kristanan moralan mondkomprenon, honoron al la grandaj tradicioj de la

hungara nacia historio, kaj persistan fidelecon al la teritoria integreco de la miljara Hungarujo. *D: nia Korespondisto en Slovakujo.*

FRANCUJO.

INTERRILATO DE LA FRANCA REGISTRARO AL LA PAPO. Aldone al nia artikolo en la N:o II de *E.R.* jen estas kelkaj novaj detaloj pri la rekomeno de la oficialaj rilatoj inter la Franca Registaro kaj la Papo.

Revenante el la Senato, kiu, kiel ni diris, rifuzis en Aŭgusto 1920 la necesajn kreditojn, la projekto denove venis antaŭ la Deputitaro. Post la diskuto ĉi tiu konatigis sian nepran intencon ritale al la projekto per plimulto konsistanta el 400 voĉoj.

»Nur je la franca vidpunkto, mi petegas la Deputitaron, ke ĝi voĉdonu la kreditojn petitajn: la afero koncernas la profiton, la ordon, la senriskecon kaj la grandecon de nia tre amata patrujo.» (Parolado de S-o *Noblemaire*, leĝraportanto.)

»La antikva prireligia kolero foriĝis kune kun la milito: la plimulto da samlandanoj nur prirevas la socialan pacon kaj multproduktantan laboradon. Estus krimo kontraŭ niaj mortintoj nuntempe revivigi religiajn disputojn; sed mi deklaras, ke kun trankvila konscienco kaj plej volonte mi voĉdonos la kreditojn, estante certa, ke mi taŭge servos la utilon de la lando» (S-ro *Chassaingne-Goyon*).

Tamen post tiel grava voĉdono la Senato, ĉiam iomete influata de la antaŭa tropartieco, denove prokrastis la diskutadon, ĝis kiam — kiel oni tiam diris — la estonta baloto okazos. La elektoj estas jam de longe faritaj; la projekto estas jam multfoje reproponita, sed ankoraŭ ĝi ne diskutigis. Tiel multaj estas la gravaj aferoj, ke, verŝajne, la Senato forgesis unu el la plej gravaj kaj urĝaj! Malgraŭ tio la afero trafas nun feliĉan finiĝon. Kvankam la Senato ankoraŭ ne voĉdonis la financajn kreditojn, oni sendis Romon eksterordinaran ambasadoron, S-on *Jouart*; kaj ankaŭ apostola Sendito, Lia Moŝto *Ceretti*, estas atendata en Parizo. Sendube ĉi tiu provizora solvo baldaŭ estos definitiva; kaj tiumaniere la religia situacio iĝos pli bona kaj mal-konfuza.

* * *

LA BOLŜEVISMO KAJ LA KRISTANISMO. La progresojn ĉiam pli gravajn de la timinda revolucia dogmaro oni klopodas kontraŭstari per la ordaj fortoj. La plejmulto eĉ de la nekatolikoj en la tuta mondo aplaudis kaj aplaudos la sensacian interpelacion de S-ro *Forgeot* ĉe la Franca Senato. Rimarku, ke S-ro *Forgeot* neniel estas katoliko kaj ke li eĉ ne praktikas iun religion.

»Evidentiĝis al mi, la ortatoro diris, ke la Katolikismo estas kvazaŭ la kontraŭveneno kontraŭ la bolŝevismo, kaj ke ĝi povas iĝi konfidinda defendilo kontraŭ ĝi, eĉ armilo por ĝin detruiri. Por ke ni

uzu ĉi tiun defendilon efike kaj ĉie, estas bezone, ke ni interakordigu kun la Estro de la katolikoj . . .

«Mi konstatas kaj mi vidas, ke post proksimume dumil jaroj en preskaŭ ĉiuj regionoj de la terglobo la Kristanismo defendas la familion, la ordon, la laboron kaj la posedon; krom la respublikaj principoj mem rilate al la digno kaj la sendependeco, la respekto al la rajtoj de la homo kaj ŝtatano, kaj al la parlamentarismo, la Kristanismo sola kaj plej senpere kontraŭstaras la detruajn, kontraŭlegajn, malamajn, diktatorajn principojn de la Bolŝevismo . . .» — *De nia franca Korespondisto, Pastro J. THIERCELIN.*

HUNGARUJO.

LA EKLEZIA DIPLOMATIO DE LA HUNGARAJ REFORMATOJ. (Laŭ artikolo de *Kalvinista Szemle (Kalvinana Revuo), Budapeŝt*).

La hungaraj reformatoj pritraktis la celojn kaj taskojn de la ekleziana diplomatio kaj eksterlanda propagando, kiujn oni povas grupigi en du fakoj: 1. La interkomunikado de la nuna hungarlanda reformataro kun la eksterlandaj fratoj, tiel por interna (anima) pliriĝo, kiel por propagando de la hungara afero en eksterlando.

2. La defendo, subteno kaj disvastiĝo de la ekleziaj kaj lernejaraj institucioj de la hungara reformata eklezio en la forprenitaj teritorioj. La lasta estas ebligata per la packontrakto de Trianon kun Rumanujo, lau kies 2a. paragrafo: Ĉiuj loĝantoj de Rumanujo havas la rajton ĉu publike, ĉu private praktiki libere ĉian kredon, religion aŭ konfesion, kiu ne kontraŭas kun la publika ordo kaj moralo, kaj laŭ la 9a. paragrafo: La rumanaj civitanoj, kiuj estas en genta, religia aŭ lingva malplimulto, havas la saman rajton kun la ceteraj per *propra* kosto fondi kaj subteni homamajn, religiajn kaj sociajn instituciojn, lernejojn, kaj tie uzi libere siajn lingvojn kaj praktiki siajn religiojn. Laŭ la 12a. paragrafo la Ligo de la Nacioj kaj ĉiu ĝia ano estas rajtigitaj observi la gardon de tiuj rajtoj kaj prijuĝi pri ofendo parte de rumanaj oficialaj superaj aŭtoritatoj. Oni esperas, ke la kelklokaj subpremadoj ĉesos, kaj la reformatoj en Transsilvanio kaj same en Jugoslavujo kaj Ĉeĥoslovakujo povas resti hungaraj kaj reformataj!

* * *

MALBELA OKAZINTAJO EN DEBRECZEN. Tiu ĉi granda hungara urbo estas nomita la «kalvinana Romo», ĉar ĝi estas de jarcentoj la plej granda reformata urbo en Hungarujo kaj la centro de la kalvinana eklezianaro. Tamen ankaŭ tie nun okazis malpacigoj inter la diversaj religianoj. Montriĝis kontraŭreformata tendenco, kio estis sekvo de antaŭa kontraŭjuda movado, aŭ plibone ties plivastiĝo flanke de la Romkatolikaro. Precipe oni ofte atakis parole kaj skribe la episkopon D-ron *Balthazár*, ĉar li estis ĉiam liberama kaj demokrata homo, liu eĉ la kontraŭjudan movadon malaprobis kaj proklamis interreligian

pacon. Tiel okazis, ke nekonatuloj enpenetris en la malnovegan, faman preĝejon kalvinanan kaj malhonogiris ĝian internon, precipe la seĝon de la episkopo. La aferon kun ekscito oni pritraktis en la tuta lando. En la preĝejo nature oni ĉesis fari diservojn. La gan de Marto per landa festeno oni denove sanktigis la preĝejon. *De nia hungara Korespondisto, S-ro P. BALKANYI.*

JUGOSLAVUJO.

RELIGIA STATO EN ŜUMADIO. Ŝumadio estas vera Serbio laŭ pura popola tipo kaj historia rolo. Ĝi estas monteta lando inter Belgrado norde, Moravo oriento, Okc. Moravo sude, Kraljevo okcidente. La vilaĝanoj estas tre superstiĉaj, precipe la virinoj. Tre ofta estas kredo je vampiro (sanguĉulo eltomba), je malbona okulo. La urbanoj estas plejmulte senkredaj, preskaŭ ĉiuj kleruloj estas atestoj, agnostikuloj.

La Ortodoksa Eklezio havas nacian karakteron; ĝi servas nun duoble. Unue ĝi partoprenas en naciaj festoj, kiuj estas restoj de prahistoria pagana religio, el kiuj du estas plej solenaj: *Slava* t.e., familia festo por gloro de antikvaj prapatroj antaŭ kristanismo; kaj *Bojiĉ* t.e. festo alfarita al kristana Kristanasko, festo por hejma spirito, kiu estas simbolata de trunko kverka ŝmirata de mielo, faruno, poste brulata en kameno. Enterigaj ceremonioj — tre paganaj — ankaŭ estas farataj kun partopreno de kristanaj pastroj. Dua rolo de la serba Eklezio estas nacia politiko. Regnaj festoj, naciaj militoj, malfermo de lernejo, inaŭguro de monumento, glorfesto de nacia heroo aŭ bonfarinto, k.t.p. estas solenataj kun partopreno de pastroj.

Ne estas malofte, ke pastro portas civilan veston, aŭ dum milito batalas en milita uniformo.

En privata vivo pastro ne estas multe estimata. Li faris sian servon dum festo aŭ iu soleno, kaj poste lia rolo finiĝis; li eniras ĉiutagan vivon. En okuloj de serba popolo pastro estas ordinara oficisto, estiminda nur dum la diservo. Popolaj proverboj kaj vortludoj ofte mokas pastron en lia privata vivo. Ĉi tie kuŝas profunda diferenco kompare kun la rusa popolo, almenaŭ antaŭ 1904, kiu rigardis siajn pastrojn — eĉ en ĉiutaga vivo — kiel diecajn personojn, portantajn sur si ĉielan gracon.

En lernejoj religia studado estas malatenta kaj senzorga. Ekzistas nur unu religia sendependa movado, tiel nomata NAZARENISMO; ĝi estas speco de pura sendogma nacia evangeliismo, bazita sur la Nova Testamento kaj persona abstinenco, nemilitado, bonmoralo.

La Názarenoj estas grupeto da homoj, tre malmultenombraj, de tempo al tempo ronde vojaĝantaj tra Serbujo, sen bruo, sen videbla sukceso.

La ateisma stato de serba klerularo estas tre interesa, eble ekskluziva. Samtempe la spiritualismo, misticismo, teozofio, kaj ĉiuj movadoj analogiaj ne ekzistas por serbia klerularo. Nur spiritismo —

en sia materia formo — havas kelke da adeptoj, kiuj ne havas reputacion de ekvilibritaj personoj.

De nia serba Korespondanto, P. STOJAN.

KIMRUJO.

LA AGADO DE LA SINODO. La Provinca Sinodo de la Eklezio en Kimrujo faris gravajn decidojn pri la starigo de Ekleziaj Tribunaloj kaj de novaj eparĥioj en la popolamasaj partoj de Sud-Kimrujo. Unuanime oni malaprobis la proponojn por novaj ŝtatleĝoj faciligantaj la eks-edziĝon. Post zorga esploro de la problemo de religia edukado en la Ŝtatlernejoj, oni elektis komitaton por kundiskuti la aferon kun reprezentantoj de aliaj eklezioj — Roma kaj Protestantaj. Ĉar la Milionfunta Kaso por kompensi la Kimran Eklezion kontraŭ la monperdo sub la Malŝtatliga Akto ankoraŭ ne atingis la sumon bezonatan, oni intencas peti pluan monhelpon en Anglujo kaj en transmaraj landoj. *De nia Reprezentisto en la Eklezio en Kimrujo, Pastro W. H. HARRIS.*

LETONUJO.

EDZIĜLEĜO EN LETONUJO. La Letona Konstituanto fine publikigis jam longe prilaboritan edziĝleĝon. Laŭ la nova leĝo edziĝoj faritaj de pastro restas same laŭleĝaj kiel tiuj faritaj de notaria fako; sed pastro nur devas trandsoni al plej proksima notaria fako nomarojn de ĉiuj ŝanĝoj en sia paroĥo. Per tiu ĉi leĝo venkis la eklezianoj malgraŭ kontraŭstaro de la social-demokratoj, kiuj proponis tule malpermesi preĝejajn edziĝojn.

KOMUNISTAJ AGOJ EN LETONUJO. La ĉefa balta regno, Letonujo, travivis dum la okupo de la lando per rusaj komunistoj en la komenco de 1919 tian teruran religipersekuton, kian eĉ nuna Rusujo ne havas. Ĝi povas esti bona ekzemplo por Eŭropo, montrante kion oni povas atendi de tiuj diktatoroj rilate al religia toleremo. Tuj post la okupado de la Letona ĉefurbo, *Riga*, komunistoj komencis fervore labori por detruo la danĝeran al ili Eklezion en la vastaj letonaj popolamasoj. Ofte dum diservado ili okupadis preĝejon, forigis la pastron kaj komencis paroli siajn malpiaĵojn al la senarma ĉeestantaro, kiu eĉ ne havis eblon por defendi sian pastron. La ruĝa standardo estis starigata sur la altaro kaj el la sankta preĝejo aŭdiĝis revoluciaj kantoj.

Kiel plej danĝerajn por tiranoj, la lastaj mortigis 29 luteranajn kaj 4 romkatolikajn pastrojn. La saman sorton devis havi unu el la plej bonaj pastroj de norda Letonujo, sed li savis sin per sia kredo, kiam la mortigantoj kondukis lin por mortigi, la kredema pastro ekparolis al ili kun tiel forta konvinko, ke ambaŭ malbonaguloj ekploris kaj forliberigis lin.

Se la komunistoj estus tie ĉi pli longe ili tute forigus ĉiujn pastrojn por detruo la lastajn spiritkondukantojn; sed tion la popolo ne per-

mesis, kaj ne nur pro granda amo al sia patrujo, sed ankaŭ pro konvinko, ke Dio donos al ili venkon, inde forpelis la tiranojn en Rusujon post kvinmonata regado.

Jam pasis du jaroj, sed la memoro pri tiuj teruraĵoj vivas hodiaŭ inter la popolamasoj. |

* * *

LA LETONA SINODO. En Aprilo okazis en *Riga* kunsido de la Letona Evangeli-Luterana Sinodo, kiun partoprenis po unu pastro kaj unu laiko de ĉiu paroĥo.

La Ministro de Internaj Aferoj, S-ro *Bergs*, dum la unuataga kunsido eldiris, ke la Eklezio neniam estas kontraŭregna kaj pro tio la regno ankaŭ ne povas esti indiferenta al la Eklezio. Letonujo devas krei demokratian Eklezion, en administrado de kiu partoprenos ĉiuj klasoj, ne nur privilegiuloj, kiel okazis antaŭe.

Bedaŭrinde okazis en la Sinodo disiĝo de letonaj kaj germanaj paroĥoj. Malgraŭ tio, ke la letonoj fondas en la superadministrado de la Eklezio por ĉiu nacio apartan sekcion, la germanoj rifuzis kunlabori kun letonaj paroĥoj kaj kunsidis aparte. Dum letonaj pastroj en sia diservo en la Preĝejo de S. Jakobo propagandis novan epokon de libera Eklezio, la germanaj pastroj en la Preĝejo de S. Petro bedaŭris, ke nun jam forpasis tiu tempo kiam ili administris tutan Letonujon kun dekfoje pli multnombra letona loĝantaro.

Fine kiam germanoj esprimis sian decidon administri siajn aferojn tute memstare sen partopreno en la Regna Sinodo, la letonoj tion akceptis, ne dezirante disputon en sanktaj ekleziaj aferoj. Tamen tiu ĉi paŝo de la germanoj faris malbonan impreson inter la letonoj, kiuj bone konscias, ke la germanoj havas por ĝi politikan kaŭzon.

La Sinodo elektis Sinodan Konsilantaron konsistantan el 20 membroj por administrado de la Eklezio ĝis la sekvonta Sinodo. *De nia Korespondisto en Letonujo.* S-ro Z. INDRA.

PORTUGALUJO.

PORTUGALA UNUIĜO KRISTANA DE JUNAJ VIROJ. Oni raportas, ke la ĵus nomita movado estas en vigla stato en Lisbono: antaŭ ne longe eliĝis nova organo *Triangulo Vermelho (Ruĝa Triangulo)*, kiu estas evangelia revuo kun portugala, angla, kaj esperanta fako. (Adr. *União Cristã da Mocidade. 5 rua das Gaiotas, Lisbã.*)

* * *

PORTUGALAJ BAPTISTOJ. La Baptistoj vigle laboras. En *Porto* ili post ne longe malfermos baptistan seminarion, kaj en *Kvimhro* estos fondata nova Baptista Preĝejo. Pastro *Johano Oliveira* revenis post dek-tri monata vojaĝo tra Brazilio: oni ne sukcesis malfermi tie la Baptistan Eklezion pro manko de loĝejoj kaj de predikejoj. *De nia korespondanto en la Port. Bap. Eklezio, S-ro H. D. GOMES DE FREITAS.*

RUSUJO.

REVIVIĜANTA RELIGIEMO: Personoj, kiuj alvenis al Reval el Rusujo, atestas, ke la preĝejoj en Rusujo estas amase plenigataj kaj ke la eklezistato ne estas malplibona ol en pactempo. Simile raportas estimata pastro el Norda Rusujo, kiu informas nin ke multaj personoj kunvenas por interparoladi pri la religio kaj ke ambaŭ plenaĝuloj kaj geknaboj lernas la Kredaĵon. Oni ĉesigis la laboron en ĉiu fabrikejo de Granda Vendredo ĝis la fino de la Paska Libertempo; kaj la lernejoj restis fermitaj du semajnojn. Okazis samtempe la unua Paska Libertempo kaj la Maja Laborista Festo. Karakteriza estis la proklamo de la Centra Komitato: «En la organizo de la Libertempo estas necese eviti ĉion, kio ofendas la sentojn de tiuj, kiuj ne estas complete liberigitaj (el la religia povo)». En *Moscow* oni plenigis la preĝejojn, precipe la Preĝejon de Kristo, la Savanto, kaj ankaŭ la apudajn stratojn. La sonoriloj sonis la tutan tagon. Tiel la kristanoj festis la Paskon. La Bolŝevikoj alimaniere festis: Antaŭ la Granda Teatro oni konstruis scenejon. Je la kvara horo soldato ion ludis per trumpeto kaj poste ĥoro konsistanta el 40—50 virinoj kantis kvar-kvin kantojn; fine ĉirkaŭ dek viroj kaj virinoj gimnastikis. La prezento daŭris proksimume unu kaj duonon da horoj. La Komunistestroj forestis: la popolo estis silenta: en la urbo la ruĝa flago flirtis sur kelke da publikaj oficejoj. La Komunistoj ĉion faris por malhonoru la Paskan Feston: proze kaj verse oni kritikadas la religion kaj la pastrojn, alvokante la kamparanon, ke li aliĝu al la Komunistaro (pri la fabrikejanoj ili estas fidplena). La *Krasnrjr Gazeta* diris «Ĉi tiu maj-festo estas ne nur la festo de la liberigo de la laboro je la kapitalo sed ankaŭ festo pro liberigo el la influo kaj antaŭjuĝo de la pastro. «Venu kun ni» alvokos la pastroj la unuan de Majo; 'Ne', devas respondi la kamparano, 'ĉar niaj vojoj estas diversaj': Per ruĝaj stadardoj oni kovros la stratojn kaj la vilaĝojn; kaj la solena muziko de la laboristaj himnoj sonados trans la paŝtejojn kaj kampojn» Tiuspecaj estis la alpetoj kaj la esperejoj de la Komunistoj; sed rezultis amasplenigitaj preĝejoj kaj nur kelke da ruĝaj flagoj sur la publikaj konstruaĵoj; personoj ĉiuspecaj — fabrikisto, kamparano kaj inteligentulo — festis la unuan de Majo la ortodoksan Paskon, kaj ne sekvis la Bolŝevikojn. Tiel atestis la gazetoj kaj aliaj raportoj el ĉiuj partoj de Rusujo. La religio venkis: tio estas la unua grava venko kontraŭ la Komunistoj; *De nia rusa Korespondanto*, S-ro V. ANOFRIJEV.

* * *

KONDIĈOJ EKLEZIAJ SUB LA SOVJETA REGISTRARO. De kiam la Caro ekŝiĝis niaj Eklezio kaj pastraro sentis sin liberigitaj de tiuj katenoj, kiujn ili portis dum tricent jaroj. Dank' al la Sovjeta Registaro nia Eklezio havas nuntempe la Patriarkon. Nuntempe la Eklezio ne tute dependas de la Regno kaj Registaro; la Registaro ne koncernas aferojn ekleziajn. Se la Registaro konfiskis terposedaĵojn,

kiuj apartenis al vilaĝaj preĝejoj kaj al monaĥejoj, — ĝi, tamen, permesas al paroĥanoj doni al pastroj tiom da desjatinoj da tero, kiom ili (la paroĥanoj) volas; ekz., la paroĥanoj povas fordoni al la pastro la tutan terposedaĵon, kiun ili (la pastroj) posedis ĝis la Sovjeta Registaro komencis funkcii. La Registaro egale rilatas al ĉiuj kredkonfesoĵ. Efektive dum la unua jaro de sia regado la Sovjeta Registaro malamike rilatis la Ortodoksan Pastraron: ĝi mobilizis la pastraron por deviglaborado. Nuntempe la Registaro nur mobilizas la pastraron por kancelaria laboro pro manko de klerularo. La mobilizita pastraro ricevas salajron kaj diversajn produktaĵojn (manĝaĵojn). La paroĥanoj tre amas siajn pastrojn kaj tre malavare pagas por la ritoj; kaj krom tiu pago la pastraro ricevas por ĉiu sia familiano kelkdesjatinojn da tero. De ĉiaj deviglaboroj la paroĥanoj liberigas sian pastraron; kaj ili ĝenerale tre zorgas pri la bonstato de la pastraro kaj la preĝejoj. Dank' al la Sovjeta kontraŭ-religia propagando vilaĝanoj kaj urbanoj fariĝis pli religiemaj. Ĉiam la preĝejoj estas plenaj de preĝantoj. Kvankam, laŭ dekreto de la Sovjetregistaro, oni devas opinii edzecon laŭleĝa tuj post ĝia registro de oficisto kancelaria, la vilaĝanoj starigis plenuman Komitaton konsistantan el vilaĝaj deputitoj, tamen ĉiuj gefianĉoj petas pastrojn edzigi ilin en preĝejo. La popolo pli valorigas eklezian edzigon ol neeklezian.

Nuntempe ni la pastraro ne havas nian eklezian gazeton, ĉar la eklezia preĝejo en Moskvo estas konfiskita de la Registaro. Ĉiujn pastrajn seminariojn kaj akademiojn la Registaro fermis, tamen ni esperas, ke ĝi iam malfermos ilin. En tuta Rusujo la Registaro fermis 763 monaĥejojn, kaj elpelis el la fermitaj monaĥejoj 50,000 gemonaĥojn. Ni devas rimarki, ke la Registaro tre severe rilatas al monaĥoj: ĝi konsideras ilin maldiligentuloj. Nur dank' al la Sovjeta Registaro la Espiskoparo ŝanĝis sian konduton rilate la pastraron. Ili nun preskaŭ patre interrilatas kun ni. Antaŭe ne ekzistis tiaj rilatoj: ili imagis sin princoj kaj la pastraron prezentis al si kiel servistaron. Nuntempe ni pli ofte vidas ilin en la paroĥoj. Antaŭe la episkopoj tre malofte vizitis vilaĝajn preĝejojn; nun preskaŭ ĉiujare. Nuntempa rittarifo de la Rusa Ortodoksa Eklezio. Kiel specimenon de la pago por ritoj, k.c., nuntempe ricevita de la rusaj pastroj ni citu tiun de vilaĝa paroĥo: Takso por ritoj forestas; kaj ĉiu pagos tiom, kiom li povos. En la citata paroĥo oni pagas por la Bapto 500—1500 rubloj; por Edziĝo, 10—50000 R; Meso 5000 R; diversaj diservoj 200—1000 R. Krom tio antaŭ Pasko pastroj vizitas la domojn de siaj paroĥanoj, kie ili legas preĝojn paj por tio ricevas ovojn. Aŭtune la paroĥanoj donas al la pastroj po kelkdekfuntoj da greno. Tion paroĥanoj faras tre volonte; sed tia konduto ne tre plaĉas al niaj malkleraj vilaĝaj komunistoj. Ifoje ili konfiskas la kolektitan grenon de pastro sed la paroĥanoj denove kolektas por sia pastro. *De Paroĥestro en la R.O.E., Korespondanto de E. R.*

ŜANĜANTA SINTENADO DE LA RUSAJ POPOLAMASOJ. Kiam la Komunistoj ekkaptis la potencon en Rusujo komenciĝis forta kontraŭ-eklezia movado. La lastan subtenis la Registaro, agitante kontraŭ la Eklezio kaj eldonante ateistajn librojn, inter kiuj estis senmoralaj versaĵoj pri Dio kaj pastroj verkitaj de la komunista poeto *Demjano Bednij*. Krom tio multaj junuloj aliĝis al la Komunista Partio, kiu ja malpermesis al siaj anoj viziti preĝejon.

En la kamparo la plimulto restis partianoj de la Eklezio, ĉar lokaj komunistoj estis proksimaj parencoj de eklezianoj kaj ne deziris disputi kun la lastaj. Pastroj havis tie preskaŭ la saman estimon kiel antaŭe. En la urboj kontraŭe la Eklezio tute malaltiĝis. La antikva sanktejo de rusoj, la citadelo Kreml, enhavanta la plej antikvajn preĝejojn kaj monaĥejojn, estis komence parte detruata dum civitana milito kaj poste okupata per la nuna Registaro, kiu trans tiuj historiaj muroj povis kaŝi de la popolamasoj vivi sian malĉastan vivon. Riĉaĵoj de la monaĥejoj estis disrabataj kaj vendataj eksterlande: kaj la rusa nacio silentis...

Nun post tri jaroj la popolamasoj vekigaĵas. Ili vidas la eraron, kiun ili faris kunirante kun komunistoj aperigantaj ĉie nur la malfeliĉon kaj la malsaton. Ili eksentas konscienciproĉon antaŭ multaj senvivrimedaj pastroj, kiuj nun devas malgraŭ maljuneco kaj senforteco labori por la komunistoj la plej malfacilan manlaboron por akiri kvaronfunton da pano, aŭ peti surstrate almozojn. Jam estas senteble, ke eĉ la komunistoj mem ekvizitemas preĝejojn, ka intereĝas pri la Eklezio; ĉar lastmonate estas eldonita dekreto, per kiu, konstatante tiun eklezion, la Registaro rememorigas al siaj partianoj, ke ili devas pli vigle kontraŭbatali tian movadon. Interesa okazintaĵo estis en Kronŝtato, la urbo kie poste oni ekribelis kontraŭ Moskvo. Ŝipanoj de Kronŝtato estis ĉefaj agantoj de la komunistoj kaj subtenantoj de ili dum tri jaroj. La Sovjeta Registaro reklamis ilin kiel «belecon kaj fierecon de la rusa Revolucio». Pasintan aŭtunon la Petrograda Ĉefepiskopo Benjamenon ricevis inviton viziti Kronŝtaton por tie diservi. La maljunulo, sciante la malpiemon de la ŝipanoj jam preparis al morto kaj kore adiaŭis kun siaj proksimuloj. Tamen, alveturante insulon de Kronŝtato, li ekmiris: antaŭ la preĝejo staris honorgardistoj. La vojo al ĝi estis kovrita per teksaĵo kaj ĉiuj esprimis al li superan estimon. Post aŭskulto de diservo la ŝipanoj same akompanis la Ĉefepiskopon ĝishejme, donacante al li multegon da nutraj produktaĵoj.

Tiu ĉi fakto videble atestas pri nova movado eklezia en Rusujo spite ĉiu agado de la Komunistoj; kaj ĝi donas bonan esperon, ke la Eklezio havos en la estonteco ankoraŭ pli grandan sukceson ol eĉ antaŭ la grandaj suferoj de la lastaj jaroj. *De nia Korespondisto en Estonujo, S-ro Z. INDRA.*

La Espero.

Tom malrapide.
Unisone.

M. I. Coates.

The first system of musical notation consists of two staves, a treble clef on top and a bass clef on the bottom. The key signature has two flats (B-flat and E-flat), and the time signature is 3/4. The music is written in a unison style, with the right hand playing chords and the left hand playing a rhythmic accompaniment of eighth notes.

The second system of musical notation continues the piece with two staves. The treble clef staff features a melodic line with some grace notes, while the bass clef staff maintains the rhythmic accompaniment.

The third system of musical notation shows the continuation of the piece. The treble clef staff has a more active melodic line, and the bass clef staff continues with the accompaniment.

The fourth system of musical notation continues the piece. The treble clef staff has a melodic line with some grace notes, and the bass clef staff continues with the accompaniment.

The fifth system of musical notation concludes the piece with two staves. The treble clef staff has a melodic line with a final cadence, and the bass clef staff continues with the accompaniment.

L'ALLEGRO

De JOHN MILTON (1608—1674).

(NOTO. Ĉi tie ni prezentas unu el du poemoj de MILTON, kiujn oni ĉiujfoje kune memoras kaj pripensas; ĉar ili estas ĉaro en siaj beleco kaj sendifekto, komplementaj en la pensado kaj vidpunkto. Tre malmultaj poemoj ekzistas, kiujn neniu malfavore kritikis: sed L'ALLEGRO kaj IL PENSEROSO apartenas al la plej alte taksataj de tiu ĉoemareto. Prof. G. SAINTSBURY, kredeble la plej klera kaj lerta angla kritikisto de la literaturo skribis, ke »rilate al la ĵamkonata ĉaro, L'ALLEGRO kaj IL PENSEROSO, neniu iam kritikis ilin alimaniere krom laŭde». Alia konata literaturisto A. J. WYATT diras »Nenio antaŭ la tempo de Milton similas ilin; depost lia tempo estas nenio taŭga por komparo kun ili. La teknikaj bonegecoj de la stilo preskaŭ superas la belecon de la temo. Ili kontentigas la kritikistojn kaj ili ravas la homaron» — REDAK.)

Ho for, Melankolio,
 naskita de Nokt' nigra kaj Cerbero
 en Stiksa kav' mizera,
 kun formoj, krioj kvazaŭ de furio!
 Elserĉu kelon ian,
 en kiu loĝas la Mallum' kaŭranta
 kaj nokta korv' grakanta;
 kaj tie, en la ebonombraj lokoj
 sub elstarantaj rokoj,
 enloĝu vi dezerton Cimerian.
 Sed venu vi, libera, bela
 Diino, kiu en ĉielo
 nomata estas Eŭfrosino,
 kaj de la homoj la Gajeco.
 Venuso bela naskis vin,
 kun pluaj du fratın-Gracioj,
 al Baĥo per heder' kronita.
 Aŭ ĉu (laŭ la rakont' pli saĝa)
 la vent' spirita de printempo,
 Zefiro, kun Aŭroro ludis,
 dum ili festis Majmatenon,
 kaj tie, sur violoj bluaj

kaj rozoj rose surverŝitaj,
plenigis ŝin je vi, filino
belega, gaja, kaj gracia?
Rapidu, Nimf', kaj kunkonduku,
kun Ĝojo, junan Bonhumoron,
Vortludojn ŝercajn kaj petolajn,
Kapsignojn, Gestojn, kaj Ridetojn
simile tiujn, kiuj loĝas
en vankavetoj de Hebeo;
kaj Ludon kiu mokas Zorgon,
kaj Ridon kun la man' ĉe kokso.
Ho venu, danĉu, dum vi paŝas
malpeze, gaje, kaj kaprice;
kaj per la dekstra man' konduku
la montan nimfon, Liberecon;
kaj se mi vin honoras taŭge,
Gajeco, min allasu ankaŭ,
ke mi kun ŝi kaj vi kunvivu
libere, senriproĉe, ĝoje;
aŭskultu kiam la alaŭdo
ekflugas, kaj la kanton trilas
el rigardejo sur ĉielo,
ĝis sunleviĝ' diverskolora;
kaj poste, malgraŭ la malĝojo,
salutu ĉe fenestro mia,
tra rozarb' aŭ vinberujo,
aŭ eglanteri' plektita;
dum la kok', per vigla krio,
forpelas lastrestantajn ombrojn;
kaj al la pordo de l' grenejo
paradas antaŭ la kokinoj:
ni ofte aŭdu la ĉashundojn
kaj kornon soni frumatene,
el flanko de montetó prujna,
kaj tra arbaro veki eĥojn:
ni foje marŝu sur montetoj
apud la ulmoj kampbarantaj,
proksime de pord' orienta,
tra kiu Suno ekparadas,

vestita per flavlumaj flamoj,
 meze de nuboj milnuancaj;
 dum plugisto, pli proksime,
 fajfas sur la ter' plugita,
 kaj melkistino gaje kantas,
 falĉilon la falĉist' akriĝas,
 ŝafist' rakontas historion
 sub kratago en la valo.
 Plezuron novan mi ektrovas
 dum mi rigardas la pejzaĝon,
 herbejojn, senkulturan teron,
 kie vagas la ŝafaroj;
 montojn, kies Brust' fariĝas
 ripozeto por la nuboj;
 kampojn, hejmojn de lekantoj;
 malprofundajn riveretojn,
 kaj riverojn grandajn, largajn;
 vidas mi fortikajn turojn
 alte inter arboj tufaj,
 kie eble belulino
 logas kvazau brila stelo.
 Proksime fumas kamentubo
 de dometo inter kverkoj;
 Koridono kaj Sirsiso
 tie sidas ĉe la manĝo
 el kamparaj kuirajoj
 preparitaj de Filiso.
 Poste ŝi rapide iras
 ligi garbojn kun Testilis,
 aŭ, se sezon' pli frua vokas,
 al fojnamaso en la kampo.
 Foje, kun sentima ravo,
 allogas monta vilaĝeto,
 kiam sonoriloj vokas,
 kaj muzik' de violono
 al junuloj kaj knabinoj
 dancantaj en la lum' kaj ombro,
 kaj junaj kaj maljunaj ludas
 en sunbrila festa tago,

ĝis foriras la taglumo.

Tiam al bier' nuksbruna,
kun rakont' pri multaj agoj
de Feino Mab' petola.
»Pinĉita estis mi», ŝi diris;
kaj li, per trompa lum' gvidita,
rakontas kiel la koboldo
laboras ŝvite por kompenso
el kremuj' por li metita,
kiel, dum nur unu nokto,
longe antaŭ la tagiĝo,
li da greno draŝis pli
ol homoj dek plenumi povus;
poste, antaŭ la kameno,
li sin etendas kaj ripozas,
kaj, satigite, forkuregas
antaŭ koka kri' unua.

Post rakontad', kuŝiĝas ili,
lulate de flustrantaj ventoj.

Al ni la urboj plaĉas poste,
kaj zum' de okupataj homoj,
en lokoj, kie kavaliroj,
vestitaj per pactempa vesto,
en bravaj aroj festparadas,
kun sinjorinoj multenombraj,
okuloj kies lumas estre,
aljuĝante la premion
ĉe spritkonkurso aŭ turniro,
dum konkurantoj penas plaĉi
al ŝi de ĉiuj honorata.

Himeno tien ofte venu
en flava rob', kun hela lumo,
kaj pomp', festeno, kaj amuzo,
antikva dramo kaj spektaklo,
vidaĵoj tiaj, kiajn revas
poetoj junaj en somero
vespere apud rivereto.

Kaj poste al teatro fama,
se oni ludas komedion

de *Jonson*, aŭ dolĉega *Shakespeare*
 de l' Fantazio vera ido,
 libere trilas arbokantojn.
 Kaj ĉiam, kontraŭ maltrankvilo,
 min ŝirmu per arioj dolĉaj,
 akordaj kun senmortaj versoj,
 kiaj povas eĉ atingi
 la profundaĵon de l'animo
 per notoj vage melodiaj,
 agorde dolĉaj, longe daŭraj,
 laŭ zorg' senzorga, ruz' naiva,
 miela voĉ' malimplikanta
 katenojn ĉiujn, kiuj ligas
 l'animon de la harmonio;
 ke eĉ Orfero mem sin levos
 de ora dormo sur la lito
 el floramaso Elisia,
 kaj aŭdos tiajn belajn kantojn,
 kiaj al Pluto tiel plaĉis,
 ke li entute liberigus
 Eŭridiceon rekapitan.
 Se ĝojojn tiujn ĉi vi donos,
 Gajec', kun vi mi vivi volas.
Tradukis el la angla lingvo, LOUISE BRIGGS.

KOLEKTITAJ PENSOJ DE FRATO LAŬRENCO.

Ne estas grave por mi, kion mi faras, nek kion mi suferas, dum mi restas ame kunigita al la volo de Dio — jen mia sola afero.

Mi estas en la manoj de Dio, kaj li havas siajn proprajn bonajn celojn pri mi; tial mi ne ĝenas min pro io kion homo povas fari al mi. Se mi ne povas tie ĉi servi Dion, aliloke mi trovas situacion por lin servi. *Kp. Ps. 56.13.*

La praktiko de la Apudesto de Dio estas la plej mallonga kaj la plej facila vojo por atingi kristanan perfektion; ĝi estas la formo kaj la vivo de l'virto; ĝi estas la granda gardilo de la peko. La praktiko iĝos facila, se nur oni havas kuraĝon kaj bonan volon.

La tuta mondo ŝajnas al mi ne plu esti reala: ĉio, kion vidas miaj eksteraj okuloj, pasas kiel fantazioj kaj revoj. Tion, kion mi vidas per la okuloj de la animo, nur tion mi sopiras; kaj ankoraŭ ne posedi mian kordezirataĵon, — tio kaŭzas por mi doloron kaj prematecon de spirito. Unuflanke duonblindigita per la brilo de la Suno de Justeco, la Dispelanto de noktombroj, kaj aliflanke kun okuloj malheligitaj per mia propra peko, iafoje mi sentas min kvazaŭ freneza. Kaj tamen mi celas, kiel mia ordinara okupo, resti en la Apudesto de Dio kun la humileco de servisto senutila kvankam fidela.

De kiam mi unue eniris la religian vivon, mi rigardis Dion kiel la celon al kiu sin direktos ĉiuj pensoj kaj afekcioj de la animo. Kiel novulo, dum la horoj difinitaj por preĝo, mi klopodis atingi konvinkon de l'vero de la Dia Estulo per la lumo de fido prefera ol per la konkludoj de l'intelekto, kaj per tiu mallonga kaj certa metodo mi kreskis en la kono de tiu objekto de l'amo, en kies apudesto mi decidigis ĉiam restadi. Tiel plenigite de sento de la grandeco kaj majesto de tiu senlima Estulo, mi iris rekte al la loko por mi difinita de la devo, nome la kuirejo. Tie, plenuminte ĉion kio vokis min, mi dediĉis al la preĝado la restan tempon, kaj ankaŭ mia laboro. Komenconte ian taskon, mi diradis al Dio kun infaneca konfido: »Ho, Dio, vi estas kun mi, kaj vi volas ke mi nun apliku min al tiuj ĉi eksteraj devoj; mi do petegas vin, helpu min per via favorkoreco, por ke mi restadu en via apudesto; kaj por tiu celo, ho Sinjoro, estu kun mi en ĉi tiu okupo mia, akceptu la laboron de miaj manoj, kaj loĝu interne de mia koro per via tuta pleneco.« Plue, dum mi laboris, mi daŭradis la intiman komunikon, oferante al li miajn servaĵojn, petegante de li la senĉesan helpon de lia favorkoreco. Fininte, mi kontrolis kiel mi estas farinta la devon; se mi trovis ke bone, mi dankis al li; se malbone, mi petis lian pardonon, kaj, ne malkuraĝigante, mi rektigis mian spiriton, kaj denove reeniris lian apudeston, kvazau mi neniam estus forvaginta de li. Tiel, relevigante post ĉiu falo, kaj ĉion farante en fido kaj amo, sen laĉiĝo, mi alvenis al stato en kiu estus por mi tiom neeble ne pripensi Dion, kiom estis malfacile ĉe la komenco disciplini min al tio.

Ho Sinjoro, Dio de dioj, kiel mirinda estas vi en ĉiuj viaj pensoj, preterpasante nian komprenon; kiel profunda en ĉiuj viaj celoj, ĉiopova en la faroj de viaj manoj!

Ĉio kion mi aŭdis la homojn diri pri Dio, ĉio kion mi mem legis, aŭ sentis pri li en la menso, ne povas min kontentigi. Senlima en sia

perfektecio, kiel li povas esti portretata, aŭ kiel povas la homo trovi vortojn por lin pentri? Nur la fido povas lin malkaŝi, aŭ instrui al mi kio li estas; per la fido mi lernas pli pri Dio, kaj tion en tre mallonga tempo, ol mi povus lerni en lernejoj post multaj longaj jaroj. Ho, fido, fido! ho mirinda virto, kiu lumigas la spiriton de la homo, kaj kondukas lin antaŭen al la kono de lia Kreinto! Ho virto tute aminda, tiel malmulte konata, kaj eĉ malpli praktikata! kiu tamen, unufoje ekkonita, estas tiel glora, tiel plena de neeldirebla beno.

La plej granda gloro kiun ni povas doni al Dio estas tute malfidindan propran forton, kaj nin fordoni plene al lia gardzorgo.

Ho Sinjoro, la sento de via amo estas por mi preskaŭ tro granda ŝarĝo. Se vi tiel volas, donu ĉi tiujn multajn pruvsignojn de via kofavoro al tiuj kiuj vin ne konas, por ilin altiri al via servo; por mi sufiĉas posedi la riĉaĵojn kiujn alportas la Fido en la kono de vi. Tamen, ĉar mi devas ne rifuzi la favorojn de via donema mano, akceptu, Sinjoro, miajn laŭdojn. Kaj, mi petus, ricevu tiujn ĉi donojn de vi donitajn; ĉar, Sinjoro, vi scias ke ne viajn donojn mi serĉas, sed vin mem, kaj mia koro sentos nenian ripozon, ĝis kiam ĝi estos trovinta vin.

Ho Sinjoro, plivastigu la ĉambrojn de mia koro, por ke mi trovu spacon por via amo. Subtenu min per via povo, por ke la fajro de via amo min ne forbruligu.

La praktiko de la Apudesto de Dio estas ege utila por nin helpi al laŭvera preĝado; ĝi detenas la menson dum la tuta tago por ke ĝi ne vagadu, kaj tenas ĝin firme fiksita sur Dion; tiel ĝi pli facile restos trankvila en la horo de preĝo.

La vivo estas plena de danĝeroj kaj de kaŝitaj rifoj, sur kiuj ni ŝippeiros sen la konstanta helpo de la favoro de Dio. Kaj kiel ni povas peti tion, se ni ne estas kun li? Kiel ni povas esti kun li, se niaj pensoj ne estas ĉiam pri li? Kiel li povas esti en niaj pensoj, se ni ne sankte kutimiĝis resti en lia apudesto, tie petante la favorhelpon de ni bezonatan je ĉiu momento de nia vivo?

Se vi volas progresi en la spirita vivo, vi devas eviti konfidon al la subtilaj konkludoj kaj rezonadoj de la nehelpata intelekto. Malfeliĉaj tiuj, kiuj penas en tio kontentigi sian deziron! La Kreinto estas la granda Instruisto de la Vero. Ni povas klopode rezonadi dum multaj jaroj, sed ege pli plena kaj profunda estas la kono de la kaŝitaĵoj de l'fido kaj de li mem, kiun li ekbriligas kiel lumon en la koro de humilulo.

Nenio povas nin sensarĝigi en la suferoj kaj doloroj de l'vivo tion, kiom ama interrilato kun Dio; fidele praktikante tion, ni trovas senpezaj la malbonojn, kiuj atakas la korpon. Ofte Dio ordonas ke ni suferu korpe, por purigi la animon kaj devigi nin resti kun li. Kiel povas iu, kies vivo *Kolos. 3. 3.* kaŝiĝis kun Dio, kaj kies sola dezirataĵo estas Dio, esti kapabla senti doloron? Ni do adoru lin en niaj *2 Kor. 12. 5.* malfortajoj, oferante al li niajn dolorojn en la tempo kiam ili premas nin, ame petante de li, kiel infano de sia kara patro, ke li nin fortigu kaj formu nian volon laŭ la sia. Tiaj mallongaj preĝoj bone konvenas por ĉiuj malsanuloj, kaj montras sin mirinda sorĉilo kontraŭ la doloro.

Ho, se mi scius ke mia koro ne amas Dion, ĉitiumomente mi ĝin elŝirus.

Ho Korfavoro malnova, tamen ĉiam nova, mi tro malfruis ekamante vin. Vi estas junaj, miaj fratoj; profitu do, mi petas, de mia konfeso, ke mi tro malmulte zorgis uzi miajn fruajn jarojn por Dio. Sanktigu vin ĉiuj al lia amo. Se nur mi estus lin pli frue koninta, se nur mi tiam havis iun por diri al mi tion, kion mi nun diras al vi, mi ne estus tiel longe prokrastinta lin ami. KREDU MIN, kalkulu perdita *komp. Rom. 6. 11.* ĉiun tagon, kiun vi ne uzis amante Dion.

Tradukis A. T. MALING el la angla traduko.

BIBLIOGRAFIO.

NOTO: L. E. R. recenzas librojn, k. c., kondiĉe, ke oni donace alsendas du ekzemplerojn.

(A) INTERNACILINGVAJ VERKOJ

SES NOVELOJ el la hungara literaturo; broŝuro 32-paĝa 11 + 15 cm.; (aĉetebla ĉe *Paul Balkanyi; Budapeŝt, VI., Hajos-u. 15.*) Tre mallongaj rakontoj sufiĉe interesaj, ne ĉiuj malgajaj; unu ŝajnas esti speco de fe-rakonto por infanoj. Ni rimarkas kelkajn preserarojn kaj la vorton »nerv-oza».

kita; karte bindita, 157 paĝoj klare presitaj; 11 + 15 cm.; (Esperanto-Verlag *Friedrich Ellersiek, Berlin s. 59; prezo 6 M. x 80*). Ni povas bone rekoni ĉi tiun rakonton al iu, kiu deziras pasigi interesan tagon. La ekscito de la krima mistero estas delikate trapenetrita de beleta antemo. Ni eĉ ekamas mem la lertan kriminaliston *von Merten*. La romano ankaŭ havas feliĉan finon. La stilo estas io-

PRO KIO? (*Argus*): internacia kriminal-romano originale ver-

mete malfacila, eble pro ia germaneco; sed preseraĵoj preskaŭ tute mankas. Ne plene konsentas ni rilate la ofte uzitan »duona horo»: ĉu tio estas vera Esperantaĵo? Rimarkindaj estas kelkaj iom novaj vortoj, ekz. *murdo*, *murdisto* (ĉu ne pli bone *murdinto*? *Jameson* ne estis profesia krimulo), *delikto* (kial ne krimo?), *bredejo* (angle: *stud*), *sanitara*,

avantaĝo, *mis-* (ekz. *misuzi*), *oni* (akuzativo de *oni*), *pundo* (L), *defraudi*; kaj ni dubas pri la gramatikeco de: »lasi sin influi de mi» pĝ. 61., kaj »antaŭ ol ni ne havos la arestordonon», pĝ. 104.

La literado de la naciaj nomoj, lokaj kaj personaj, estas perfekta, ĉu anglaj, aŭstraj, francaj, germanaj, italaj aŭ usonaj. Do, legu la romanon! — L. A. L.

KRONIKO DE LA EKLEZIA ESPERANTISTA LIGO.

(A) ĜENERALA.

NOVAJ LIGANOJ. Ni kore bonvenigas kiel novajn liganojn: Matthew Francis Coates, M. A., Presbitero (*Hove*); Harry Sidney Curry (*London*); Arthur Rees Fairbairn (*Ryton-on-Tyne*); Humberto Theodoro Gomes de Freitas (*Funchal*); Violet Gardner (*London, N.*); John Hobert Hall (*Bolton*); Edward Hinchcliffe (*Withernsea*); James Hales Pudney (*Sittingbourne*); H. Rollason (*Toronto*); W. A. Archibald Shipway, Presbitero en la Episkopa Ekl. de Ameriko (*Washington*).

REPREZENTONTO DE LA LIGO ĈE LA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN PRAHA, ĈEHO-SLOVAKUJO: Kun multe da plezuro ni anoncas ke Pastro H. N. Nowell, Paroĥestro de *Northwich* (*Cheshire*, Anglujo), reprezentos la Ligon en *Praha* dum la Universala Kongreso. Ni esperas, ke ĉiu, kiu deziras informon pri la Ligo aŭ volas diskuti la rilatojn, k.c., de la Anglikana Eklezio al aliaj eklezioj, sin turnos al li. Se eble ni aranĝos anglikanan

di:ervon en Esperanto ĉe la Preĝejo de S-ta Marteno en la Muro (*Martinstr.*).

✠ JOSEFINE FINHOLT. Per la morto de F-ino *Josefine Finholt* de *Kristiania* la 3an. de Marto pro kancero la Esperanto-Movado perdis tre valoran laborantinon, unu el la skandinavaj pioniroj. Ŝia foriro estis ankaŭ al la Ligo grava perdo; ĉar depost 1916 ni profitis per ŝiaj lojalaj subtenado kaj kuraĝigo. La memoferemo de F-ino Finholt estas montrita per ŝia lasta decido rilate Esperanton: S-ro *Bonnevie* skribas al ni, »Tiom pli doloras nin tiu grava perdo ĉar ŝi ĵus estis eksiginta el sia ofico kiel popollerneja instruistino por ke ŝi de nun oferu tempon kaj forton tute al Esperanto!» Ni imitu ŝin per tiuspeca oferemo; ĉar nenio povas kontraŭstari movadon tiuspiritane.

Por la propagandisto, studento de Angla lingvo aŭ Esperanto,
kaj aŭtoro de etimologiaj kart-ludoj.

Angla kaj Esperanta Etimologio

ENGLISH AND ESPERANTO ETYMOLOGY

CHARLES G. STUART-MENTETH, B. A. GNON.

„Classes of words, English and Esperanto, so arranged and printed as to bring out the roots in them“.

„Specoj de vortoj en Angla lingvo kaj Esperanto tiamaniere aranĝitaj kaj presitaj, ke elmontriĝis la radikoj en ili“ (traduko). — *Amerika Esperantisto*.

„Utila lernilo por atentigi la anglan publikon pri la multaj Esperantaj radikoj en ilia lingvo“. — *Holanda Pioniro*.

„Por encerbigi la Esperant-radikojn tiu ĉi verketo por anglolingvanoj tre taŭgas“. — *Svisa Espero*.

10 pencoj: 4 respond-kuponoj.

B. E. A., 17 HART STREET, LONDON, W. C. 1

ESTAS LA DEVO
DE
ĈIU BRITA ESPERANTISTO
helpi al

**LA BRITA
ESPERANTO-ASOCIO**

Kaj tiel fortigi la Movadon en la
Brita Imperio
Prospekto senpage ĉe la B. E. A.

Adreso: LA SEKRETARIO DE LA BRITA
ESPERANTO-ASOCIO 17 HART STREET,
LONDON, W. C. 1

LA EKLEZIA ESPERANTISTA LIGO

HELPAS AL RECIPROKAJ AMI-
KECO KAJ KOMPRENIĜO IN-
TER ĈIUJ KRISTANOJ; KAJ
TIEL FARAS VOJON AL LA
REUNUIĜO DE LA EKLEZIOJ.
ALIĜU por HELPI kaj profiti,

Eksterlanda Kotizaĵo: Ordinara, 3 ŝi-
lingoj; Subvencio, 6 ŝ.;
Enlanda Kotizaĵo: Ord. 3 ŝ.; Sub-
vencio, 5 ŝ.

Hon. Sek.: *Pastor A. J. Ashley,*
The Vicarage,
Farnley Tyas, apud Huddersfield, Anglujo.

Tiu, kiu reklamas en la internacia lingvo, konatiĝas tra la tuta mondo.

DENTEX

Purigajo por artaj dentoj
Rapide purigas falsdentariojn kaj
similnovigas ilin

Ĝi pereigas mikrobojn tuj kaj donas
senton de plezuriga pureco

1/- PER LADSKATOLO

Poŝtelspezo aldone

Angle, 3d. (125 spesoj)
Fremdlande, 6d. (250 spesoj)

W. MINCHIN, Farmaciisto
15 WESTGATE, GLOUCESTER

**ALFARITAĴO de la
STENOGRAFO de PITMAN
al ESPERANTO**

(Afrankite, 1 ŝ. 1 p., Sm. 0.55)

de A. W. LYNDRIDGE
F.I.P.S., F.B.E.A.

ĈIU ESPERANTISTO

DEVAS UZI

La ESPERANTO FONTPLUMON

7 ŝ.d., Sm. 3.75

DE

**La Estro: Business Training College
and Typewriting Copying Office**

WESTON ROAD
SOUTHEND-ON-SEA, ANGLUJO

AGENTOJ BEZONATAJ ĈIE!

SAMIDEANOJ ATENTU!

Kelkaj Motivoj, kial neniu kuiristo, kuiristino aŭ dommastrino devas esti sen

SPICE-ERBO

(REG.)

Bonega spico por la preparato de ĉiuspeca nutraĵo.

En tiu ĉi unika produkto troviĝas, saĝe kaj harmonie kunigitaj, la plej higienaj kaj agrablaj kvalitoj de diversaj herboj kaj spicoj.

Ĝi enhavas nenion krom naturaj elementoj, kies koncentriĝo ebligas utiliĝon per etaj dozoj en ŝparema kaj facila uzado.

Unufoje uzite, ĝi instigas al konstanta uzado. **SPICE-ERBO** tuj sin montras nepre necesajo por la plejbona kuirarto.

Por la preparado de supoj, viandsukoj, fiŝaĵo, vaporumita viando, viandmiksaĵoj, viandpastroĉoj, kort- kaj ĉasbirdaĵo, ĉiuj specoj de fritita viando, kaj vegetaraj manĝaĵoj, ĝi estas tute nesuperebla.

ĈIAM ĜI ESTAS TUJ PRETA POR UZADO.

Frank H. Lockyer Supply Co., Ltd.

LONDON CUSTOMERS can always be supplied with Spice-Erbo, and Zenito Crumbled Wheat, at our London Branch.

The Zenito Cuisine and Restaurant, 4, Cheniston Gardens, (Wright's Lane). Two minutes from High Street, Kensington (Underground).

AGENTOJ BEZONATAJ ĈIE

de la fabrikistoj,

Frank H. Lockyer Supply Co., Ltd.,
Liverpool, Anglujo.